ISSN: 0871-9241

# NiaBulteno

APRILO-MAJO 2004 ABRIL-MAIO • Numero **84**

Informa Bulteno de Portugala Esperanto-Asocio
*Boletim Informativo da Associação Portuguesa de Esperanto*

Rua Dr. João Couto, 6-r/cA, PT-1500-239 LISBOA • +351 +217 141 359 • info@esperanto.web.pt • www.esperanto.web.pt

## XX-a Renkontiĝo de Portugalaj Esperantistoj

# *Tábua 2004*

pĝ.3-6: **plenan programon & praktikajn indikojn**

*Ne perdiĝu! Kunportu al la Renkontiĝo tiun ĉi ekzempleron de* NB! *Ĝi vin gvidos tra du tagoj da esperantumado, plenaj je okazoj por lingva trejno, movada debato, ripoziga promenado, amikiĝoj kaj retroviĝoj. La 18-an kaj 19-an de septembro, en* Tábua.

# Eĉ du en IJK!



*La Internacian Junularan Kongreson ĉeestis Nuno kaj Rute. Legu lian vervan raporton (ankaŭ) ĉinumere.* **pĝ.8**

**Televido en esperanto:**

# ITV konvinkas

*Prelego en Lisbono finis la martan prelegvojaĝon de Flávio Rebelo, ĥarisma iniciatinto. Ankaŭ ĉe ni skeptikuloj "konvertiĝis"…* **pĝ.8**

**Nove elektita asocia logotipo:**

# Pufe al facila vento!

**pĝ.7**

***AVANTE!*-FESTO SEN ESPERANTA BUDO** **pĝ.11**

*Nia Bulteno* (informa bulteno de **Portugala Esperanto-Asocio**)
Numero **84** (apr.-maj. 2004)
**ISSN:0871-9241**
**Redaktoro:**
António MARTINS-Tuválkin
**Eldonkvanto:** 400 ekzempleroj
Komputile kompostita per *Adobe InDesign™* 1.6
**Abono (4n-roj, nur ekster PT):**
8-ono de landa MA de UEA
**Limdato** por *NB*84: 2004.09.10
**Finkompostita** en: 2004.09.04

***Portugala Esperanto--Asocio***
**Associação Portuguesa de Esperanto**
*(pessoa colectiva de utilidade pública)*
⊙ sabate 15:00-19:00; sideje
✉ Rua Dr. João Couto 6 r/c A
PT-1500-239 LISBOA
☎ +351 217 141 359
📠 +351 217 933 924
💻 ‹info@esperanto.web.pt› aŭ
‹portugala@esperanto.web.pt›
💻 http://www.esperanto.web.pt/

**Fondita** en 1972.04.25
**Landasocio** de U.E.A. ekde 1979
**K-ano A:** Faria de BASTOS
**Membroj:** 84(+84) en 2004.09.04
**Monata kotizo:** 1,50€
(emeritoj kaj sub-18-jaruloj: 1,00€; malriĉuloj: 0,00€)
**Aniĝkotizo:** 2,50€

### *GVIDORGANOJ:* *(ekde 2003.03.29)*

### *Ĝeneral-Asemblea Stabo:*

**Prezidanto:** José MARTINS
**Sekretarioj:**
Miguel OLIVEIRA
Werther SACRAMENTO

### *Estraro:*

**Prezidanto:** Faria de BASTOS
**Vicprezidanto:** MARTINS-Tuválkin
**Sekretario:** Alcino ALVES
**Kasisto:** Silva ALMEIDA
**Voĉdonantoj:** Gonçalo NEVES
Alexandra G. e PAZ
Luís LADEIRA (eks.)

### *Kontrol-Komitato:*

**Prezidanto:** Vítor MARQUES
**Revizoroj:** Francisco MELO
Manuel RUAS

### *NEELEKTITAJ POSTENOJ:*

**Instruado:** (vakas)
**Libro-Servo:** Silva ALMEIDA

## *Pli vastas la tempo*

ol la paĝoj de nia bulteno! Tuta jaro pasis jam ekde la forpaso de Franco SIMÕES, sed daŭre amikoj nekrologas (*NB*85)… Jen ankoraŭ publikiĝas raporto pri nia XIX-a Renkontiĝo (pĝ.10), jam pri la XX-a necesas praktikajn indikojn… Plia raporto de la sama aŭtoro ĉinumere publikiĝas (pĝ.8), sed nun resume, ne felietone — la plenan version legu rete, kun koloraj fotoj! Kaj same rete jam legeblis preskaŭ ĉio kio aperas ĉinumere… Ja *Nia Bulteno* akompanas la ŝanĝiĝojn kaj forpasojn portataj de tiu tempfluo, kaj ĝiaj paĝoj, eĉ se ne plu unikaj, restas gravaj kaj signifaj dokumentoj. Post tro longa paŭzo (ses monatoj!), publikiĝas nun *NB***84** kaj tuj baldaŭ *NB***85**, disdonota unue surloke dum nia Renkontiĝo. Ĝis tiam salutas via ***Red.***

**Biblioteko:** Werther SACRAMENTO
**(periodaĵoj)** Wílson BRÍGIDO
**(eltondaĵoj)** MARTINS-Tuválkin
**(diversaĵoj)** (vakas)
**Libreldonoj:** Rocha da COSTA
**Fotarkivo:** Olga ALMEIDA
**Subvencipetoj:** Sandrina RODRIGUES
**Ret- kaj komput-aferoj:**
Nuno MAGALHÃES, MARTINS--Tuválkin, Luís Oliveira, Luís MOURINHO

### *Lokaj Sekcioj:*

**PLUS — Portugala Unua Loka Sekcio** (nordokcidenta sekcio)
**Repr.:** Nuno MAGALHÃES
**Fond.:** 2002 **Membr.:** 11(+12)
✉ Rua Paulo da Gama, 550-12ºA
PT-4150-589 PORTO
☎ +351 917 721 868
💻 ‹plusanoj@clix.pt›

### *Junulara Sekcio:*

Portugala Esperanto-Junularo
*Jovens Esperantistas de Portugal*
(L.S. de TEJO ekde 1996)
**Fond.:** 1993 **Membr.:** 12(+16)
⊙ ✉ ☎ 📠 💻 ĉe P.E.A.

### *Honoraj Membroj:*

António da Silva ALMEIDA
Alsácia Fontes MACHADO†
Manuel de FREITAS†
Alberto Pedro da SILVA†
Adelino Franco SIMÕES†
Manuel de Sousa TEIXEIRA†

### *ALIAJ ORGANIZOJ:*

**Nogeso — Norda Grupo de Esperanto-Studado**
⊙ 1-an dimanĉon de ĉiu monato 21:00; kafejo *Estrela d'Ouro*; str. *Fábrica*; Oporto
✉ ☎ 📠 ĉe PLUS
💻 ‹esperanto@mail.pt›
🕷 http://www.nogeso.cjb.net/

**Saluton! — *Cooperativa dos Amigos do Esperanto e da Natureza***
⊙ 2-an dimanĉon de ĉiu monato 15:00; *Cacém*
✉ Avenida Bissaia Barreto, 2
PT-3360-191 PENACOVA
✉ Rua do Miradouro, 12
PT-2735-300 CACÉM (SNT)

**Brageso — Braga Grupo de Esperanto-Studado**
⊙ ĵaŭde 21:00; kafejo *S. Brás II* (iama *Mutamba*); str. *D. Pedro V*
💻 ‹esperanto_braga@mail.pt›

### *LANDAJ REPREZENTANTOJ:*

**U.E.A.:** (vakas)
**ILEI:** João SANTOS (deleg.)
**E.E.U.:** Faria de BASTOS
**TEJO:** Ricardo TOSCANO (A-kom.)
**TEĴA:** Alan ROMERO
**ILERA:** Francisco MELO (CT1CGE)
**EJA:** Faria de BASTOS
**SAT:** Pedrosa ALVES (kotizp.)
**IKEK:** Alcino ALVES
**IKUE:** Salete dos SANTOS

EKSTERA MOVADO:

# *Balotojn bojkote*

Eŭropa Esperanto-Unio, kunlabore kun siaj landaj asocioj, lanĉis **atentigan kampanjon okaze de la eŭropparlamenta balotado**, okazinta lastan junion. Malfrue aniĝinte, Portugala Esperanto-Asocio dissendis majfine al ĉiuj (13) partioj kaj koalicioj demandaron pri komunikado en Eŭropo, tradukitan kaj adaptitan el la kampanja versio (vd. http://lingvo.org/pt/4/767). La operacion gvidis Luís Ladeira (plu laboranta, post demisio — vd pĝ. 10); kunlaboris Vera Pinto (kontaktojn kaj informserĉadon) kaj Martins-Tuválkin (datenbazon kaj retpaĝon). La alvenantajn respondojn oni povus akompani, ekde 2004.06.02, en http://www.esperanto.web.pt/pe_lingu.html, sed fakte **neniun respondon** ni ricevis el la partioj. En tiu retpaĝo troviĝas do nur citaĵoj pri lingvpolitiko de ni ĉerpitaj el la kandidatiĝprogramoj de kelkaj partioj. Malgraŭ la fiasko (sed kies?), tiu ĉi iniciato atentigis la publikon — nia pria retpaĝo ricevis entute 486 vizitojn (99 nur la 14-an de junio!), rezulte de sciigo pri ĝi en diversaj portugaliaj politikaj retdiskutejoj. ***AMT+LL+VP***

XX–a R.P.E.: PRAKTIKAJ INFORMOJ:

# *Ĥoranar' volonta*

Unu el la spektaj programeroj konsistos el ĥorkantoj prezentitaj post surlokaj provludoj: ĉiuj ĥoranoj estos "normalaj" partoprenantoj (kantemon nepre menciu je aniĝo!) — Alcino Alves gvidos tamen surbaze de sia profesinivela sperto pri ĥorkant(ig)ado. ***AMT***

XX–a R.P.E.: PRAKTIKAJ INFORMOJ:

# *Kie gasti?*

Oni antaŭvidis tri ĉefajn eblecojn:

**Tendumado:** uzeblas senpage apuddoma tereno en vilaĝo *Póvoa de Sinde* (4 km malproksime de niaj ejoj); tie haveblos elektro kaj kranakvo (konfirmotaj) kaj eblas senpaga veturigo al/el *Tábua*.

***Penacova:*** Granda gastdomo, situanta en apuda urbeto *Penacova* (35 km for de *Tábua*), estos je nia dispono kontraŭ tre speciala prezo: 7,00 € nokte (sed ĉion memserve!). Necesos aranĝi ke unu el kvar gastoj tie, almenaŭ, disponigu aŭton por iro kaj veno al/el *Tábua*.

Krome, en la *Tábua*-a municipo ekzistas kelkaj **hoteloj**, **gastejoj** kaj **pensionoj**. Jen kelkaj:

Turismejo *Pedra da Sé* ★★: 2 km malproksime de niaj ejoj; kampara medio; duĉambraj bungalovoj kun propra banejo kaj kuirejeto; 2-lita: 60,00 €, 3-lita: 75,00 €, 4-lita: 90,00 € (matenmanĝo inkl.).

*Hotel Turismo de Tábua* ★★: ĉambroj kun propra banejo; 1-lita: 32,50 €, 2-lita: 44,00 €, 3-lita: 65,00 €, 4-lita: 75,00 €, kroma lito: 13,00 € (m-mnĝ. inkl.).

*Residencial João Brandão* ★: ĉambroj kun propra banejo; tre proksima; ĉiu lito en 2- aŭ 3-lita ĉambro: 17,50 € (matenmanĝo **ne** inkl.).

*Pensão D. Natália:* simplaj kondiĉoj; iom malproksime de niaj ejoj; komuna banejo; ĉiu lito en 2- aŭ 3-lita ĉambro: 10,00 € (matenmanĝo **ne** inkl.).

*Pensão Meira (D. Dina)*: tre bazaj kondiĉoj; komuna banejo; ĉiu lito en 2- aŭ 3-lita ĉambro: 10,00 € (matenmanĝo **ne** inkl.). ***MP+AMT***

XX-a R.P.E.: PRAKTIKAJ INFORMOJ:

# *Kiel atingi?*

La Asocio organizas komunan veturigadon de bezonantoj far stirontoj (tre gravos ankaŭ por tiuj kiuj gastos en *Penacova*). Nepre do sciigu frue de kie vi intencas ekiri, kaj ĉu vi pretas veturigi aliajn en via aŭto aŭ ĉu vi bezonas mem veturigon. Ĝis ĵaŭdo la 16-a ĉiuj estos sciigitaj: kiujn veturigos ĉiu stironto, kaj kun kiu veturos (kaj de kie startos) ĉiu veturigoto. Principe benzinkosto dividiĝos inter la veturigitoj, stiranto kontribuas per stirado kaj aŭteluzo.

**Vojindikoj (aŭte)**

El *Coimbra*, per IP3 (= E801 = E.N.2), direkto: *Viseu*; eliru al ***Tábua*** per E.N.234-6, en *Santa Comba - Dão*.

El *Castelo Branco*, per E.N.112 + E.N.2, direkto: *Coimbra*; en *Góis* eliru al E.N.342, direkto *Arganil*, kaj tie al E.N.337, direkto ***Tábua***.

El *Viseu*, per per IP3 (= E801, = E.N.2), direkto: *Coimbra*; eliru al ***Tábua*** per E.N.234-6, en *Santa Comba - Dão*.

**Vojindikoj (trajne)**

La plej apuda stacidomo (10 km) estas *Santa Comba - Dão* (*Linha da Beira Alta*; sur *Linha do Dão* ne estas trajnservo).

El *Coimbra* / *Pampilhosa* venas trajno vendrede posttagmeze je 14:47, 17:00, 19:35 kaj 21:10;sabate matene je 08:41, 10:53 kaj 12:35.

El *Guarda* / *Ciudad Rodrigo* / *Castelo Branco* venas trajno vendrede posttagmeze je 15:28, 17:46 kaj 19:31;sabate matene je 06:43, 07:56, 09:31 kaj 12:12.

Sciigu (al 919 645 079) alvenhoron por ebla veturigo (senpage) al *Tábua*. Lokaj busoj haltas ĉe la stacidomo veturante al *Tábua* nur je 11:16, 14:16 kaj 17:31 (ŝanĝoj post sept.10-an); la bushaltejo situas apud (ne antaŭ!) la stacidomo, maldekstre malsupre.

**Vojindikoj (buse)**

Ĉiutage al Tábua ekde *Coimbra*, *Caldas da Rainha*, *Leiria*, Lisbono kaj *Marinha Grande*. La alvena busejo situas konvene proksime de la akceptejo. ***AMT+MP***

---

XX-a R.P.E.: PRAKTIKAJ INFORMOJ:

# *Manĝoj*

**Komuna tagmanĝo**

Okazos sabate je la 13:00, en la restoracio *O Mercado*. Temos fakte pri la unua programero, ankoraŭ malpost la Malferma Sesio, sed ne "deviga" pro aparta pagendeco: 8,00 € (eble mapli) pro:

- supo (kresa, spinaca aŭ porea — decidote)
- moruo laŭ mastra stilo; akompano:
  - verda vino el la mastra kelo (*da casa*)
  - terpomkaĉo kun mariska garno (salikoko)
- fruktsalato (pomo, oranĝo, mango, aktinidio, ananaso)
- kafo (portugalstile)

**Aliaj manĝoj**

Pri aliaj manĝoj ĉiu memzorgu. Supre estas ligo al restoracilisto; abundas la portugalie kutimaj kafejoj kaj restoracietoj en la biblioteka strato; du superbazaroj krome apudas. ***AMT+MP***

XX–a R.P.E.: PRAKTIKAJ INFORMOJ:

# *Programo*

**Vendredo, 17-a**

16:00 **Libera vespero** *(Laŭvola anticipa alveno de organizantoj kaj de kelkaj partoprenontoj. Prelego al lokaj lernejanoj — konfirmota.)*

**Sabato, 18-a**

10:00 **Ĥora provludo** *(malstrikta horo; ĥoranoj venu vendrede aŭ sabate tre frue) eko: 10:00; daŭro: 02:00; loko: Biblioteko; zorgas: A. Alves*

12:00 **Akceptado kaj enloĝigo** *eko: 12:00; daŭro: 01:00; loko: Bazara parkejo; zorgas: A. Martins*

13:00 **Komuna tagmanĝo** *eko: 13:00; daŭro: 02:00; loko: Restoracio "O Mercado"; zorgas: M. Pinguinha*

15:00 **Malferma sesio** *(inkl. omaĝo al Franco Simões; ĉeestos repr. municipestraro) eko: 15:00; daŭro: 00:30; loko: Municipestrarejo; zorgas: A. Martins*

15:30 **Muzika interludo** *eko: 15:30; daŭro: 00:30; loko: Municipestrarejo; zorgas: I. Tuvalkina*

16:00 **Promeno** *(inkl. piknika / restoracia manĝo) eko: 16:00; daŭro: 03:30; ariĝloko: Biblioteka parketo; zorgas: A. Alves*

19:30 **Vespermanĝo** *(libera) eko: 19:30; daŭro: 02:00*

21:30 **Kolokvo pri Pasporta Servo** *eko: 21:30 daŭro: 00:45; loko: Biblioteko; zorgas: A. Paz*

22:15 **Deklamkonkurso** *eko: 22:15; daŭro: 00:30; loko: Biblioteko; zorgas: G. Neves*

**Dimanĉo, 19-a**

10:00 **Kolokvo pri Eŭropa Unio kaj Esperanto** *eko: 10:00; daŭro: 01:00; loko: Biblioteko; zorgas: L. Ladeira*

11:30 **Ekskurso** *eko: 11:30; daŭro: 03:00; ariĝloko: antaŭ la Municipestrarejo; zorgas: A. Alves*

14:30 **Ĥorkantoj** *eko: 14:30; daŭro: 01:00; loko: Biblioteko; zorgas: A. Alves*

15:00 **Kolokvo pri Esperanto en Portugalio** *eko: 15:00; daŭro: 01:30; loko: Biblioteko; zorgas: A. Martins*

16:30 **Ferma sesio** *(inkl. anonco de XXI-a R.P.E., en 2005) eko: 16:30; daŭro: 00:15; loko: Biblioteko; zorgas: M. Pinguinha* ***AMT+AA***

XX–A R.P.E.: PRAKTIKAJ INFORMOJ:

# *Organizantaro*

Ĉiu programero havas responsulon. Surloke, direktu al tiuj viajn demandojn, sugestojn kaj plendojn.

**Alcino Alves:** Okupiĝas ĝenerale pri programkunordigo, ĉefe pri distra/spekta flanko. ✆ 964 935 714

**António Martins-Tuválkin:** Publika programo: neesperantistajn vizitantojn, ĵurnalistojn. Ankaŭ gastigkunordigon kaj diskutprogramerojn. ✆ 934 821 700

**Manuel José; Pinguinha:** Loka organizanto. Prizorgas ĉefe kontaktojn kun la "ekstera mondo". ✆ 919 711 756

**Alexandra Guerra e Paz:** Gvidos kolokvon pri Pasporta Servo.

**Irina Tuvalkina:** Prezentos muzikan interludon.

**Gonçalo Neves:** Gvidos deklamkonkurson.

**Luís Ladeira:** Gvidos kolokvon pri esperanto en la Eŭropa Unio. ***AMT***

XX-a R.P.E.: PRAKTIKAJ INFORMOJ:

# *Lokoj surloke*

Oni klopodis arigi ĉiujn programerojn en apudajn lokalojn, je interpaŝebla distanco (vd. mapetojn sur pĝ.12):

**Bazaro (*Mercado Municipal*)**

Vasta subĉiela ejo kun abunda parkloko ĉirkaŭ la municipa bazaro (kiu estos fermita sabate posttagmeze). Alvenantoj ariĝu tie: en la okcidenta flanko (antaŭ la restoracio *O Mercado*) aŭ, se pluvos, en la orienta flanko, kie estas kovrita parkloko por ĉ. ses aŭtoj kaj vasta same kovrita spaco por homariĝo. Tie okazos la dismeto de bagaĝo en la kofrojn de tiuj kiuj veturigos aliajn gastigatojn en *Penacova*. Samloke estas la restoracio *O Mercado*, kie okazos la komuna tagmanĝo.

✆ 235 413 822 (restoracio)

**Municipestrarejo (*Salão Nobre da Câmara Municipal de Tábua*)**

Tie okazos la Malferma Sesio kaj la tuj sekva Muzika Interludo, sabate je la 15:00. Veninte el la restoracio oni ariĝu antaŭ la arkaro (aŭ ene de ĝi, se pluvos) kaj kune eniru je alvoko. La arkaro kaj ŝtuparo taŭgas kiel fotfono; b.v. ne foti en la Salono mem. (Estos permeso por unu fotisto nur.) Oni petas nek eniri nek eliri dum la programeroj (estos paŭzo je la 15:30). Je la 16:00, oni de tie grupe iros al la biblioteka parketo. B.v. iri eĉ tiuj kiuj ne intencas partopreni la promenon, tiel ke la loko de la vespera programo estu konata al ĉiuj.

Dimanĉe je la 11:30 oni ariĝu antaŭ la arkaro (aŭ ene de ĝi, se pluvos) por enbusiĝo al la ekskurso.

✆ 235 410 340

**Biblioteko (*Salão Polivalente da Biblioteca Municipal João Brandão*)**

Tie okazos plej multaj programeroj. Fotado permesatas. Oni rajtas el- kaj reen-iri, sed b.v. silenton kaj rapidon je tio. En la kolokvoj, la sola laborlingvo estos esperanto. Neesperantistaj vizitantoj disponos pri portugallingva asisto en la komunporda halo, kie viziteblas ankaŭ ekspozicio pri esperanto (vd. pĝ.6).

✆ 235 418 550 *AMT*

---

MOVADO:

# *Ekspozicio vagas*

Kreita por la XVII-a R.P.E. (1997.07) kun apogo de la barejra municipestraro (vd. *NB***71**:4-5,12), nia portebla ekspozicio pri esperanto konsistas el 12 grandaj paneloj (100×70 cm) plasttegitaj, ĉiu pri aparta eco de niaj lingvo kaj movado (vd. http://www.esperanto.web.pt/informoj.htm). Laŭcele, tiu ekspozicio devus konstante cirkuli disinter taŭgaj ejoj sed tio apenaŭ okazis: Krom konstanta pendado en la sidejaj muroj, ĝi aperis nur en *Pontinha* (ODV), Avejro, Koimbro kaj ie dise en Lisbono. Junie de 2004, plano ĝin portis al *Bragança* (vd. *NB***85**), de kie ĝi devus plui al Oporto, Avejro, Koimbro kaj fine al *Tábua*. La mezajn etapojn la fato tamen bruligis kaj jen dum la antaŭrenkontiĝa semajno (sept.11-19) la paneloj pendos, kun taŭga akompano sona kaj libra, en la municipa biblioteko de *Tábua*. De tie ĝi iros al Oporto — intere okazos tre necesa aktualigo de kelkaj paneloj, zorge de Nuno Magalhães. *AMT*

ASOCIO:

# *Logotipo finfine aprobita*

La logotipo de Portugala Esperanto--Asocio konsistas el kvinpinta stelo misformita tiel, ke ĝi ŝajnas desegnita sur ventpufan ŝipvelon, uzante konatajn simbolojn pri Esperanto kaj pri Portugalio.

La logotipo estos uzata por signi la markon de nia asocio en diversaj medioj. Jam en la retpaĝaro, ote en aliaj (leterpapero, kovertoj, eldonaĵoj, afiŝoj, prospektoj, pinglinsignoj k.s.).

En koloriva medio la stelo estu malhelverda (ekrane: RGB: 0-153-0; papere: CMYK: 70-0-100-0 aŭ Pantone 361). Se kunestas la nomo de nia asocio, portugal- aŭ esperant-lingve, ĝi estu lokigita dekstre de la logotipo (t.c. laŭ la skribfluo), kompostita prefere per dika kursiva senserifa tiparo (se enestas ambaŭ lingvversioj, nur unu estu kursiva); la teksto altu tiom kiom la logotipo, en unu, du, tri, aŭ ses linioj. ***AM***

**Raporto**

Oni diskutis kaj analizis ĉiujn proponojn, prezentitajn ĝis la 31a de Novembro de 2003, por la nova logotipo de la Portugala Esperanto-Asocio (laŭ regularo en *NB***81**).

Por plenumi tiun taskon, ĵurio estis invitita de la estraro de P.E.A.la 22-an de Decembro de 2003: Joaquim Calado (teknika desegnisto), Isabel Coelho (arkitekto) Alan Romero (ĵurnalisto) Miquel Gómez (maketisto) kaj mi mem (Alexandra Paz, tiam studento pri animacia kino). Ĝi atingis finan decidon la 27-an de Marto de 2004, kiu estis aprobita de la Ĝenerala Asembleo du tagojn poste.

La plej multo de la ĵurianoj elektis kiel plej trafan proponon numero 07 (el 11), pro ĝia beleco, simpleco kaj originaleco. Ankaŭ ĉar ĝi tre bone spegulas la viglon dezirindan por nia asocio, ni konsideris ke propono numero 7 klare montras portugaliecon, sed tamen ĝi ne riskas misreprezenti nin ene de portugala medio per la uzataj simboloj.

Tiun ĉi proponon kreis la forpasinta Franco Simões, uzante la sidejan komputilon dum eble lia lasta vizito tien, nelonge post la alvoko en *NB***81**:12.

Mi ŝatus ankaŭ danki ĉiujn proponintojn, pro ilia laboro. ***Alexandra Paz***

---

ASOCIO:

# *Ĝenerala Asembleo*

La 27-an de marto, laŭ alvoko, okazis en nia sidejo plia ordinara kunveno de la Ĝenerala Asembleo, kun ĉeesto de 12 membroj (inkl. 2 el 3 stabanoj). Tiu kvanto estas ja etas (malpli ol 7%!) sed neniel nekutima (vd. *NB***63**:6). Oni diskutis laŭ tagordo la 2003-an raporton de la Estraro kaj ekstertagorde okupiĝis pri kromaj temoj, i.a. aprobo de la asocia logotipo laŭ ĵuria rekomendo. ***AMT***

MOVADO:

# *ITV: estonton nun!*

Mi venis al la konferenco de Flávio Rebelo (vd. *NB*83:12) kun tre skeptika antaŭpenso. Ĉu nia movado ne jam vidis tiom tro da bombaste prezentitajn projektojn kiuj montriĝas poste blufaj kaj mispufaj? Ĉu ne tradicias en nia movado ke entuziasmo kuniras naivon sed seriozon diskreto?

Aliflanke mi ankaŭ malemis konduti tro malnaive kaj senfide, kaj la antaŭtagon mi devigis min longe krozi Ĝangalon. Mia impreso tamen nur ŝanĝiĝis, kaj draste, per la prelego mem: Flávio trankviligis multajn el miaj duboj eĉ antaŭ ol la demandara parto de lia kolokvo, kaj la ceterajn dialoge.

Kial paroli pri donacoj kaj ne pri pruntoj? (Pro la jura kompliko de internacia konttenado — sed reale temas pri pruntoj, ja estas promeso pri redono.) Kial ne kandidatiĝi je fondusoj? (Jes, ITV ricevas fondusan monon, sed strebas diserigi la monfontojn, por ne resti "en la manoj" de eta grupo) Kiel rilatas al UEA, Civito, SAT, spiritistoj? (Ne aparte rilatas, estas sendependeco.) Kiel riceveblos ITV de malvaste konektitaj homoj/landoj? (Elsendflua tekniko (*broadcast streaming*) agordeblas je bildgrandeco kaj refreŝtakto.) Kaj tiel plu.

Flávio estas entuziasma sed ne naiva, sagaca sed ne aroga, obstina sed ne kaprica. Lia nova projekto estis realisme elpensita kaj li ĝin (finfine) prezentis taŭge dum la prelego. Dum la sekva vespermanĝo, en sidejapuda restoracio, konfirmiĝis mia renovigita impreso: ITV indas, kaj endas al ĝi kontribui!

*António Martins-Tuválkin*

ARANĜOJ:

# *Mia menso restis en la rusia IJK**

■ *Nuno Magalhães*

Okazis ĉisomere la 60-a Internacia Junulara kongreso (IJK), apud vilaĝeto *Repniki* (ĉe urbo *Kovrov*, regiono de *Vladimir*, Rusio). Ekde 1995 (lasta rusia IJK) ne estis portugalaj partoprenantoj, tiujare António Martins kaj Ricardo Toscano, ĉijare mi ([1]) kaj Rute Jesus. Estis antaŭ- kaj post-kongresoj sed la kongreso mem okazis inter la 10a kaj la 17a de Julio, ĝia temo: «June kaj kune» (aŭ, kiel Joakim, Svedio, bone rimarkis: «june kaj kule» — tiu eksa skoltgastejo ja ŝvarmis je tiuj bestetoj).

Post tipaj fuŝaĵoj antaŭvojaĝaj kaj kun preskaŭ nula scio de la rusa lingvo, mi finfine atingis Moskvon kaj aliajn esperantistojn. Ne estis loko por mi hotele sed mi gastis kun aliaj ĉe ies domo ie en la urbo.

Post vagada tago en Moskvo, busoj al IJK ekeliras. La vojaĝo estis longa kaj varmega sed min distris parolado kun apudseĝa vojaĝanto, S-ro Anatolij. Iom frapis min trafi homon kiu ege similis al Lenin sed postklarige mi malkovris ke li fakte laboras kiel lenina sozio ĉe la Ruĝa Placo. Do, se vi iam tien iras aŭ trairas, nepre (esperante) lin salutu.

Samtage, post registriĝado, estis malferma cerimonio. Apud la loka ruĝa

* Plena teksto legeblas en http://kvardek-kvar.ath.cx/arkivoj/000061.htm.

**1** Kiam ajn mi prezentis min kiel portugalo, kutima reago estis Ah, vi estas la **alia** portugalo! Mi ne miras do, se multe da personoj fakte ne scias mian nomon!

placo estis flava ujo sur vagoneto kie flanke legeblas "KBAC" per ruĝaj literoj. Per rapida tabelkonsulto mi komprenas “kvas”. Iu poste klarigis al mi: temas pri trinkaĵo farita el pano kaj akvo. Mi ne bone komprenis la rimedon sed estas likva, refreŝiga, ne mortigas kaj tie/tiam eĉ senpaga. Sufiĉas por mi!

Estis eskursoj al apudaj urboj sed vekiĝi antaŭ 11a matene, feriante, por mi estas peko. La programerojn mi konsultis ĉe la bazeja pordo kaj la plej-multo ne interesis min. Noktoj pasis per bierumado ĉe la katanuligita drinkejo kaj promenado tra la amasejo per (ĉu itala?) tamburo. Estis ankaŭ rivero, saŭno, naĝejo kaj biera kaŝmerkato dank’ al tre afabla ulo nordeŭropa.

Mi partoprenis ruslingvan kurson sed per miaj apenaŭaj konoj de la alfabeto mi ne tiom profitis kiom mi ŝatus. Tamen, delonge mi revas lerni la rusan, ĉinan kaj araban (ĉiuj facilegaj lingvoj) sed mi estas pigra prokrastigisto.

Estis koncertoj kelkaj. Mi nur eltenis du muzikojn el Ĵomart kaj Nataŝa antaŭ ol forkuri sed *Junas kaj pli junas* bonegis, same kiel *Perdita generacio*. Estis interesa sesio ĉe orienta korto, sufiĉe mensfluga laŭ flua muziko, sed per tiom da homoj en tiom malgranda ejo iĝis ŝvitsesio...

Kaj, pro mia fuŝa kvazaŭnaĝado rivere (branĉo kaŝita subakve) D-ro Volkov, la kortestro, min indikis al la malplena kuracejo. De tie mi iris bazejen kaj estis sufiĉe bonŝanca trafi Normand, afablega (kaj nura) kanada estaĵo kiu min kuracis. Mi havas memoraĵon el Kovrov! Eble persune ĝi malaperos. Ah k-diskon de *Persone* mi aĉetis kaj ankaŭ kongresan ĉemizon.

Kaj mi certe forgesis amason da aferoj. Estas teo.

Lasta nokto: dancumado (mirakle mi dancis!), naĝumado, promenado, parolado, ado, ado, ado. Enpaki ĉion, kontroli ĉu mi forgesis ion, dufoje (fakte jes, nigran harbandon restis rusie). Reveni el amasejo bazejen tra arbaro memorante ĉiuj kongreserojn refoje mensbilde. Matenmanĝo kaj unua buso eliras. Ĝis revidoj, sopiro jam kaj volo ne eliri. Dua buso je la 11a kaj denove la emo resti porĉiame, korpremo, tutsimple daŭrigi la etoson kaj ne eliri. Konscio ke ne eliri implicas resti sola en malplena domaro por esti formanĝita de kuloj. Eliri ne tiom malbonas.

Mi ja ŝatis mian unuan esperanto-renkontiĝon internacian. Nun mi atendas IJKn61 ĉar mi estas povra kom-patinda junulo kiu ne havos monon/tempon por ĉeesti I.S.n. Sed zorgu homaro, Pollando estos invadita de portugalaj estaĵoj fuŝkapablaj!!

Reveno alportis min moskven denove kaj danke al Saŝa kaj Svetlana mi (kaj aliaj) tranoktis ĉe Moskva Esperanto-Centro ([2]). Sekvatage ĉiuj renkontiĝis ĉe iu el la pluregaj metro-stacidomoj: tre bela, vitra kaj sur rivero. Ĝis revidoj, vagonpordoj fermiĝas kaj mi tro rapide estas denove buse flughavenen.

Post tranokto ĉe sidejo de P.E.A. mi trajnumis denove miaurbe malgraŭ tio ke mia menso restis rusie dum pluraj sekvaj semajnoj. ■

**2** Oficiale kaj malfeliĉe la esperanta nomo de mia urbo estas “Oporto”. “*Porto*” (originale) ja povas konfuzi, do mi durkape preferas uzi vorton “Portoo”.

XIX–a R.P.E.:

# Veturpeti esperantien (3/3)*

■ ***Nuno Magalhães***

La verda babilado ĝoje fluis sed tuj poste ni estis elirigitaj al *Vila Franca* denove. Atendante la trajnon post stacidoma adiaŭo, ni kantadis e-kantojn kaj malkovris fluton kiu ankaŭ ludis laŭkante, per la mano de Franco Simões. Kaj jen, tiel finis la renkontiĝa tago.

**Reveni malpli facilas**

Dimanĉo: la reventago. Iom malfruete ni eliris al proksima bushaltejo kaj komencis veturpeti. Kvarono da horo kaj unu stultulaŭto poste iu stiristo haltis por peti informon… kaj evidenti ni memveturigis ĉar ĉiuj scias ke *Santa Iria* estas ĉiam antaŭen. Ni eliris en la unua benzinejo trovita survoje, ankoraŭ en *Bobadela*, aŭ apud ĝi. Verŝajne la unua veturpeto ĉiam rapidas, sed ne la dua. Ni atendadis minimume du horojn sensukcese. La nura escepto estis sinjorino kaj ŝiaj du filoj, kiuj haltis por demandi kien ni irus, sed ne iris laŭ nia direkto. Ni daŭre atendis kaj finfine decidis paŝi ĝis la pli apudan A1-enirejo: rondirejo trafikplena ĝi estas, sed neniu haltis dum pli malpli 3 horoj. Kvar aŭ kvin stultuloj transveturis kaj la sama sinjorino, kun ŝia filo, nin vidis kaj haltis. Ni tiel kaj dankante estis alportitaj al la A1-enirejo de *Alverca*. Se atendado estus ŝatokupo ni ja riĉus, veturpetante apud la indikilo «A1 Norte» kiel ni

* unua parto en *NB***82**:3-4; dua parto en *NB***83**:8-9.

ASOCIO:

# Demision elrevite

*Sekve de estrara diskuto en 2004.05.29 okaze de neokazinta kunveno, estrarano Luís Ladeira eksiĝis el la Estraro per la jena demisiletero. (Menciindas ke post tio li tamen plu agadas pri ekstera movado.)*

«Voĉdonanton de la Portugala Esperanto-Asocio mi rezignas. Unu jaro kaj du monatoj post mia estrareniro mi fermas la miskomprenon. Tiu miskompreno kunligiĝas kun la starigo de la propra kandidatiĝinta listo al estraro de PEA. Listo sem programo, do senceloj, voĉdonita de malpli membroj ol la voĉdonintoj, en ĝenerala asembleo okazinte je la 29-an de majo 2003. Miskompreno de iu, kies naiveco ne permesis sin kompreni la reala situacio de nia "movado", kaj iluziiĝis pri la ebleco de ŝanĝi tion.

»Do, dum unu jaro kaj du monatoj mi klopodis agigi la estraron laŭ du ĉefaj celoj, t. e., disvastigi la internacian lingvon per programo por kreigi esperantajn instruistojn, kaj promocii agadojn kunligitaj kun eŭropaj aferoj. Bedaŭrinde tio ĉi ankaŭ montriĝis miskomprenon. Mi konfuzis miajn celojn kun estraraj celoj. Sed ĉio, kiun mi povas diri pri tio, estas ke la celo de listo sem programo nur povas esti regi ĉiutage la tagecon.

»Finfine mi tute komprenis tion. La lasta guto estis konstakti ke ne estis sufiĉe da kvarono por kunsidi la estraro maje. Do oni nenion decidas pri aferoj kunligitaj kun proksimaj eŭropaj balotoj. Sufiĉas, mi rezignas!»

***Luís Filipe Paulo e Ladeira***

estis. Kelkaj stultuloj, du brazilanoj kiuj bedaŭrinde ne iris niavoje, pluregaj aŭtoj enirantaj A1-n kaj, denove, la sama sinjorino kun ŝia filo kaj hundino nin alproksimiĝis. Mirinde, ŝi nin veturigis al A1-benzinejo de *Aveiras*, veturante eĉ trans la pagejon. Ni ne sciis kiel danki, tioma afableco mutigas.

Sed, finfine post horoj petante, ni estis en pli facila loko por veturpeti. Feliĉe ni ne multe atendis kaj verda aŭto haltis: estis parolema sinjoro kun amproblemo. Jam jaron li daŭre vizitadis sian pasiulinon en Lisbono sed, problemo, lia edzino tion malkovris! «Kaj nun?» li demandis. Tia parolado kun ĉi busstiristo daŭris, sed diskuttemoj abundis. Fifnine mi lin konsilis prizorgi siajn filinojn kaj, poste, sekvi kion ajn lia koro sugestus. Alvenante al benzinujo li eĉ demandis al alkostaŭtstiranto ĉu li volus veturigi «ĉi tiujn afablajn junulojn al urbo *Porto*» sed la sinjoro loĝis apude.

La veturpetado ne estas tuja fako: dum nia restado en *Aveiras*, gardisto alproksimiĝis, demandante ĉu ni havadis problemojn, ktp, ĉar veturpeti estas neleĝa; ni agis stultule kaj naive kaj li foriris. Verdaj aŭtoj alvenis post, ni nombris 4 kaj porde legeblis "GNR"; ni iom dubis pri la leĝafero sed havis nenian alian eblecon. Virino, sola, haltis, sed ŝi irus al *Torres Vedras*; iom post sentegment(igebl)a aŭto haltis kaj per tiu ni alvenis al *Porto*. La vojaĝo estis rapideca kaj la parolado diversspeca: komence pri kial la stiristo, jarsperta dando, trovis ĉiujn bestojn poligamiaj kaj tiel pravigantaj lian liberemon, sed ankaŭ pri liaj petveturspertoj (dum lia junaĝo li estis ŝtelita en Romo kaj forigita de trajno pro nepago en Francio), lia profesio (radiologisto en *Porto*-a privata hospitalo), ktp.

**Sekura haveno**

Aĥ, mia urbo, kiel bone ĝin surpaŝi refoje! Estis la 22:30a kiam ni alvenis kaj la 22:31a kiam ni memoris pri busoj dum la nokta reto. Ni paŝis ĝis la hejmo de Xana, kie ni restis; iom post mi prenis kukojn kaj paŝis ĉe min. Eniris la hejmon, salutis la katon, salutis la patrinon, duŝis, dormegis.

Estis mia unua longdistanca petvetura sperto. Konklude, la plejmulto da personoj timas veturigi, tamen, tiu estas pli rimarkebla landcentre. Tiuj kiuj veturigas estas ofte solaj uloj kiuj mem petveturis kaj ĉiam agnoskas ke tiam estis multe pli facile tiel vojaĝi. ■

MOVADO:

## *Sur la liva bordo*


Post longa preparado kaj anticipa peto, ne okazos tamen **IKEK-budo** (Internacia Komunisma Esperantista Kolektivo) en la ĉijara ***Avante*-festo**. Malgraŭ la agnoskita "fidindeco" de la organizuntaj kamaradoj (W. Sacramento, A. Paz, A. Alves), la Portugala Komunisma Partio decidis ne gastigi eksterajn organizojn en sia festo.

**Ree surstraten**

Ripete de la iniciato raportita en *NB* **81**:5, partoprenis pacpostulan manifestacion martkomence kelkaj esperantistoj. Pro uzo de nialingvaj simboloj kaj sloganoj konatiĝis Andre Vaatz, germana esperantisto loĝanta en Lisbono, de tiam ofta sidejano. *AMT*


## *Ne perdiĝu al Tábua!*

(Pliajn informojn pri la vojo sur paĝo 4.)




## *Kaj ne perdiĝu en Tábua!*

(Pliajn informojn pri la lokaj ejoj sur paĝo 6.)




REMETENTE:
**Associação Portuguesa de Esperanto**
***Portugala Esperanto-Asocio***
Rua Dr. João Couto, 6-r/c A
PT-1500-239 LISBOA
PORTUGAL

DESTINATÁRIO:

nº de sócio / *annumero*

últ. quota paga / *lasta kotizpago*

foto / *foto*

*laste ricevita interŝanĝnumero*